



Al ĉiuj recenzoj el el Esperanto
sub la Suda Kruco

Al ĉiuj recenzoj

Al ĉefpaĝo Originala literaturo

GEMO LITERATURA

Sabira Ståhlberg: *Durankulak*. Varna (Bulgario): Bambu, 1998. 79p. broŝ. – Recenzas Donald Broadribb.

Nur malofte aperas spektakle altkvalita literaturaĵo originala en Esperanto. Kvankam literaturo abundas en Esperanto, plejparte la kvalito de la originalaj verkoj estas tre malalta; ĝenerale ili estas ĉiurilate amatoraj kaj mallertaj. Esceptoj estas malmultaj: en la proza fako elstaras la romano de nia propra Aŭstralia Esperantista aŭtoro Trevor Steele, *Sed nur fragmento*. Iom surprize, ankaŭ legantoj de altkvalita prozo malmultas inter la Esperantistoj.

Laŭ la ĉiujaraj "furor-listoj" de verkoj venditaj de la Libroservo de U.E.A., nur kelkcent ekzempleroj de literaturaj verkoj ensume ĉiujare vendiĝas. Do eble ne mirigas ke tiel malofte profesikvalitaj verkistoj aperigas originalajn romanojn kaj novelojn en nia lingvo.

Sed ĉi tiu nelonga romano, *Durankulak*, estas miriga escepto. Se vi ĝuas legi altkvalitan prozon tamen perdos la oportunon aĉeti kaj legi ĝin, vin preterpasos unika literaturaĵo originala nia.

La etulo tuj antaŭ mi jam premas sian nazon kontraŭ la vitro de la kaso. Aha.
Evidente eksterlandano. Kion li volas ankoraŭ, nun? Je tiu ĉi sezono la turistoj
jam estas for. Nenio plu restas en la regiono por sperti. Nur pluvaĉas.

Kaj ĉiukaze, krom la belaj plaĝoj estas ne multo vidinda ĉi tie.

Li volas per buso veturi ien. Kien?

Mi ne povas imagi, ke mi ĝuste aŭdis.

Durankulak. Durankulak?

Li turnas sin, ricevinte bileton. Okulvitroj pendas, falontaj, sur la nazpinto.
Nigra hararo strebas en ĉiujn direktojn. La dorsosakego svingiĝas sur lia dorso.

Aha, japano. Interesas. Li aĉetas bileton al Durankulak.

Durankulak estas fantazieca vilaĝo, situanta ĉe la ekstremo de lando nenomita, tuj inter la agroj kaj la senhoma sovaĝa stepo kie ŝajne abundas nur lupoj, kaj kiu estas ankaŭ la loĝejo de la Besto.

Unufoje jare haltas buso en Durankulak. Kutime ne pli. Nur iam antaŭ trideko
da jaroj venis inspektoro de la ŝtata sanadministracio, kaj tiam haltis la buso
duan fojon ĉe Durankulak. Pri tio oni parolis longe en la urbo. Eĉ nuntempe
okazas, ke iu mencias la aferon, tiom eksterordinara ĝi estis...

En la printempo ĉi jare jam haltis la buso unu fojon ĉe Durankulak.

La tuta urbo venis por spekti...Se ne estas vojaĝantoj ĝis ĉi tie, la buso revenas pli frue, kvankam la reguloj postulas, ke ĝi veturu ĝis la fino. Sed la ŝoforo timas la stepon, kien li devas veturi por turni la buson: la vojo tro mallarĝas ĉe Durankulak. Feliĉe por li neniuj scias, neniuj kontrolas; ne ĉi tie.

Kiu mistero do sin kaŝas en Durankulak? Nu, nur ke ĝi estas ia Brigadoon, vilaĝo preskaŭ tutaparta de la cetera mondo, vilaĝo en kiu okazas tute ne anticipeblaj eventoj, vilaĝo en kiu la homoj estas...nu, ne elstare bonvolaj nek afablaj nek helpemaj, sed kies moroj postulas amikecajn agojn neatenditajn. Ekzemple, ke hotelgasto (maloftega evento!) ja estas gasto, do oni ne rajtas peti aŭ eĉ akcepti pagon! Vilaĝo en kiu ne nur la homa lingvo sed evidente ankaŭ tiu de la hundoj estas parenca al fora, fremda lingvo kiun indas priesplori kaj kies parencecon indas studi.

Kaj en Durankulak oni tradormas la vintron, samkiel sciuroj, tial la eksterlandano devas forlasi la vilaĝon por tiu periodo.

Nia Japana "turisto", tamen ne estas ordinara turisto, malgraŭ la fotilo pendanta de lia kolo kaj la frazlibro Japan-nacilingva kiun li konsultas konstante por sin duonkomprenigi. Li estas sciencisto, kiu serĉas foti tre unikan birdon, kiu ekzistas nur en (aŭ eble apud) Durankulak, kaj pri kies ekzisto tre dubas la specialistoj alilandaj.

Efektive ni trovas ke tiu unika birdo ja ekzistas, kvankam ĝia naturo estas ankaŭ eksterordinare unika, kaj la misio de nia Japana sciencisto nur parte plenumiĝas.

Ĉu komika romaneto, kiel supozigas kelkaj recenzintoj? Nu, ĝi ja havas sian komikan trajtaron, kaj verŝajne estus multe tro aŭdace flustri ke eble ĝi havas kaŝitan signifon.

Ĝi estas leĝera legaĵo, lingve bonega (ne tre ofta afero en nia literaturaĵaro originala!), stile tre plaĉa, bone presita (ankaŭ ne oftega evento Esperantista), modeste sed firme broŝurita...

Entute, se vin maltrafos ĉi tiu verko, al vi mankos tre ĝuplena literatura sperto.

[Sabira Ståhlberg](#)

[Durankulak](#)